# LA INFORMILO

***

informbulteno pri esperanto

bulletin bilingue d'information sur l'espéranto

ELDONISTO : ESPERANTO-FEDERACIO DE ORIENTA FRANCIO

EDITEUR: Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto

Maison des Jeunes et de la Culture
27, rue de la République, 54000 - NANCY - Fr.

PĈK - CCP: 1997-72 W NANCY

nouvelle série
trimestriel
1er trim. 1978
n°21



abonnement
un an: 10 F
UNU JARO : 10 F
(8 INTERN. KUPON.)

TO★FLASH.... ESPERANTO★FLASH.... ESPERANTO★FL

## en direct des CONGRES 1978

LE CONGRES UNIVERSEL DE U.E.A. (VARNA, Bulgarie)

compte déjà plus de 1200 adhésions à la date de ce jour! Deux "caravanes"ssont actuellement en préparation au départ de France; l'une utilisera l'avion, l'autre l'automobile. Le thème du Congrès, LANGUE INTERNATIONALE, EDUCATION INTERNATIONALE, s'inspire d'une recommandation de l'UNESCO dont le Directeur-Général, M. M'BOW, a participé au précédent Congrès de UEA à Reykjavik en 1977.

LE 51ème Congrès de S.A.T. (ASSOCIATION SUPRANATIONALE)

*qui s'est tenu l'an passé à AUGSBOURG, aura lieu à LECTOURE (Gers) du 15 au 21 juillet; il sera précédé du Congrès de la section française de SAT, du 25 au 27 mars à RENNES.*

CLERMONT-FERRAND ACCUEILLE DU 12 AU 16 MAI 1978

les espérantistes français réunis en assises nationales. Dans le cadre des festivités, un concours original récompensera les les meilleures chansons en espéranto, ainsi que leurs interprètes.

VELIKO-TARNOVO (Bulgarie) POLE D'ATTRACTION des Jeunes Espérantistes du monde entier.

*Au cours de ce Congrès que la ville de POITIERS avait accueilli l'an passé, ils y débattront de tous les problèmes des jeunes confrontés aux problèmes de la civilisation moderne.
C'est à la même date que se déroulera le Congrès du "Mouvement Espeérantiste Neutre" à JACA (Espagne)*

## LE MUSEE NATIONAL D'ESPERANTO DE GRAY

devient l'un des plus importants du monde. Dans ses 8 salles de 230 m2 offertes par la Municipalité, ce musée constitue à la fois une exposition permanente et un rassemblement d'archives et de documentation à la disposition des chercheurs et des historiens. La documentation permanente reçue de France et du monde entier en fait désormais l'un des premiers musées internationaux du genre avec celui de VIENNE (Autriche).

## RADIO-MOSCOU EMET A NOUVEAU EN ESPERANTO!

*C'est en effet la station soviétique qui inaugura en 1923 l'une des premières émissions en langue internationale. Cette nouvelle diffusion qualifiée d'expérimentale a eu lieu les 4 et 5 février. D'autres pourraient suivre en fonction des réactions éventuelles des auditeurs.*

## LES "PRESSES UNIVERSITAIRES DE FRANCE" ET L'ESPERANTO

Dans la série universellement connue "QUE SAIS-JE?", l'ouvrage de P. JANTON, Professeur d'Université, édité en France sous le titre "L'ESPERANTO", est en cours de parution en Allemagne. Intitulée"Einführung in die Esperantologie", cette étude exhaustive constitue une contribution importante à l'interlinguistique, science qui connaît actuellement un essor sans précédent.

## LES SEJOURS INTERNATIONAUX AU CHATEAU DE GRESILLON (49150-BAUGE)

*Situé dans l'une des plus belles régions de France, ce centre culturel voué à la pratique et à l'apprentissage de l'espéranto acquiert une renommée sans cesse grandissante. Le stage des vacances de Pâques réservé entre autre aux enfants, sera suivi de 3 périodes estivales (3/22 juillet, 23 juillet/3 août, 13août/2 septembre)offrant aux débutants et aux pratiquants un programme éclectique fourni sur simple demande à l'adresse ci-dessus.*

## LE CONSEIL GENERAL DE LA MOSELLE SE PRONONCE

a une forte majorité pour l'introduction de l'espéranto dans le cycle normal des études obligatoires et demande que la proposition de loi n° 1667 qui suggère l'acceptation de la langue internationale comme spécialité linguistique facultative dans le second cycle, soit soumise à la Commission Culturelle et présentée au vote des Députés. Cette motion a été votée par le C.G. au cours de sa session extraordinaire du 18 janvier 1978.

**documentez-vous!**

« QUE SAIS-JE ? »
LE POINT DES CONNAISSANCES ACTUELLES
N° 1511

L'ESPÉRANTO
Pierre JANTON
*Professeur à l'Université de Clermont-Ferrand*

PRESSES UNIVERSITAIRES DE FRANCE
108, BOULEVARD SAINT-GERMAIN, PARIS

*Viaj aperiendaj tekstoj devos atingi la redaktoron antaŭ la 20-an de majo 1978*

ATENTU! NE FORGESU VIAN KOTIZON POR 1978 AL "FEDERATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPERANTO", CCP 1997-72 W NANCY.

## SOCIETO ZAMENHOF ★

Se vi deziras finance helpi por la prospero de UEA, vi povas fariĝi membro de la *Societo Zamenhof*en definita jaro. La jara kotizo por 1978 estas 220F. Gi aldoniĝas al la aliaj kotizoj de UFE kaj UEA.

Aliĝinte al *Societo Zamenhof* oni ricevos de tempo al tempo leteron de la prezidanto de la Asocio kun aktualaj informoj pri ĝia stato. Okazas ankaŭ speciala akcepto por membroj de la SZ ĉiu-jare en la kadro de la UNIVERSALA KONGRESO

## RIPOZIGA RENKONTIGO EN MONTARO ★

La Kultura Esperanto-Centro Strasburga invitas vin partopreni la 20/21-ajn de majo al la interkonatiĝa renkontiĝo en la montaro *"LA HINGRIE"* en la turista domo de AF-UFF. Atingebla per la valo Ste-Marie-aux-Mines RN 59, gare de LIEPVRE RD 48 ROMBACH-le-FRANC ĝis LA HINGRIE? je la *kapelo La Hingrie* vi sekvas dekstran vojeton ĝis la domo (500m). Vi povas tranokti, prepari viajn manĝaĵojn kaj trinki senkostan, puran akvon! Ni kart-, ŝakludos kaj kantos! Dimanĉon, promenado tra la bela montaro.

Bonvolu anonci vian alvenon al S-r° ZIPFEL F, 20 rue de Labroque 67000 STRASBOURG.

## 11-a KULTURA SEMAJNFINO en "JUNKERWALD" ★

*Multaj el ni jam ege aprezis tiujn renkontiĝojn, kiujn zorge preparas niaj Sarlandaj Amikoj.*

*Ili denove invitas nin la 5an kaj la 7an de majo 1978 por kiel kutime ĝui riĉan programon, kiu antaŭvidas kursojn kaj prelegojn. Priatentu la "Gvidontojn":*

Pastro KINDLER (tutmonde konata sub la kromnomo "TRIKSINI") respondecos pri la kurso A (*komencantoj*)

Olivier TZAUT ( ĉu vi ne jam aĉetis lian diskon?... rapidu! la stoko elĉerpiĝas!) el Svislando estros kurson por progresintoj, nome kurson B

... kaj Prof. Reto ROSSETTI (Anglujo) enkondukos en la *Stilistikon de Esperanto*.

*Ni ne forgesu la krad-rostaĵon okaze de la vendreda konversacio... la di-servon katolikan, la vin-gustumadon kun Anton Kiefer, la varian vesperon (TZAUT kantos kaj muzikos!!!), la arbaran migradon dimanĉan, ktp...*

*Suspektiĝas ke tiu renkontiĝo iĝos plej sukcesa. Petu aliĝilon TUJ (ĉiukaze antaŭ la 22a de aprilo!) je :*

➡ SAARLANDISCHER ESPERANTO-BUND e.V.
Franz-Schubert-Str. 26
D-6602 DUDWEILER (Federacia Germanio)

## NIA PERKORESPONDA KURSO ★

dum la lastaj monatoj finlernis tiun kurson:

- Fin° Brigitte LAMBRON en 54400 MEXY kaj Sr° René DUMONT en 57560 ABRESWILLER, ambaŭ gviditaj de nia juna spertulo Jacques LINDAU( Thionville)
- Sin° Maryse PUTINO en 54270 ESSEY lès NANCY, gvidita de S-r° KRAEMER (Guebwiller)

- Sr° Alain MATSCHEK en 55100 VERDUN, gvidita de S-r° Denis (Bar-le-Duc)
- Sin° Jeanne ORY en 54230 CHALIGNY, gvidita de Sr° BERGEROT (Epinal)

Gratulojn al ĉiuj!

POR LA NOVA LABOR-JARO kelkaj kunlaborantoj deziris ĉesi sian laboron. Ili estu kore dankataj pro la sindone plenumitaj taskoj! Bonvenon al kelkaj novuloj. Jen nia nuna kunlaborantaro:

Fin° Anna JACQUOT, Sin° Hélène LERDUNG, Sr°j DENIS, GROSSMANN, ZIPFEL, ETIENNE, DEGRELLE LINDAU, LIENHARDT, KRAEMER, GREINER, REMY, DEGUÎNES, GODART, MEIER, LUDWIG kaj COLNOT. ... entute 17 personoj.

*De oktobro ĝis januaro mi sendis al la regiona gazetaro 46 komunikojn. Mi povis kontroli la aperon de 24 el ili. Sekvis 120 informpetoj kaj 40 novaj gelernantoj aliĝis al nia kurso elementa. Ek de januaro 2 komunikoj estis senditaj al 4 gazetoj en departem. 51 kaj 52. Almenaŭ 2 aperis, ili rezultigis 10 leterojn kaj 6 gelernantojn en tiuj 2 departementoj, el kiuj pluraj en CHAUMONT. Ni povas esperi,ke ni povus ektrovi aktivulojn kaj krei eble grupojn en tiu regiono.*

*JP COLNOT*

*


## STRASBURGO

Estu bonvenataj multnombraj al nia 37a Orient-franca Esperanto-Kongreso, la 8/9ajn de aprilo. La LKK regule kunvenas kaj jam prizorgis plej agrable programon, restadon kaj gastigadon en la

*FOYER DU JEUNE OUVRIER CHRETIEN*
*6 rue de Bitche en STRASBURGO*

Por atingi la kongresejon, sekvu el la stacidoma placo la bulvardojn WILSON, POINCARE CLEMENCEAU ĝis rue de Bitche. Per aŭtobuso 10 veturu ĝis la haltejo "*rue Oberlin*"

comment se rendre au lieu du congrès ?




Sin° MULLER gvidas kurson kun 7 partoprenantoj en la tiel nomata *"UNIVERSITATO de la TRIA AĜO kaj de la DISPONEBLA TEMPO"*
Fin° LEPEIX gvidas kurson kun 3 partoprenantoj

Sr° KNECHT, nia antaŭinta, valora prezidanto salutas ĉiujn siajn gekonatulojn.

F. ZIPFEL

## NANCY

*Finfine povis ek-funkcii Esperanto-Klubo en liceo GEORGES DELATOUR, Nancy-Beauregard. En tiu vasta liceo kun 1500 gelernantoj, la eblecoj povus esti grandaj. Entute 25 gelernantoj enskribiĝis por lerni Esperanton, sed ne ĉiuj, ĝis nun, partoprenis la lecionojn. La unua informkunveno fiaskis pro alarmo pri bombo! Dum la sekvanta kunveno ĉeestis 4 gelernantoj, nun je la 3a leciono (per "JUNULKURSO") 16 entute ĉeestis. Ŝajne kelkaj instruistoj de la liceo interesiĝos sed ili deziras kurson specialan por ili...*

*JP COLNOT*

# nia vivo en...

METZ

... aŭdis pri E° pere de la prelego de Sr°DE ZILAH kiu okazis en la kulturdomo St-Marcel, vendredon la 24an de februaro.
La prelegon antaŭis 3 komunikoj en la ĵurnalo "LE REPUBLICAIN LORRAIN" kaj dudeko da afiŝoj; krome disponigis la ondoj "radio-lorraine"champagne"FR3 po 3 minutoj por 2 senperaj intervenoj.
Kvindekkelko da interesaj personoj ĉeestis la vesperkunvenon. La preleganto elvokis la necesecon de strukturo de la planlingvoj, refutis la argumentojn de la Ministerio pri Edukado, klarigante kiel la strukturo de Esperanto respondas al natura neceso, do ne estas "artefarita" laŭ la mallaŭda signifo de tiu vorto. Tiel estis elmontrite, ke erras tiuj, kiuj parolas pri "manko de kulturaj fundaĵoj". La prelego estis ilustrita per tekstoj kaj poemoj, interalie por montri la perfektecon de esperantoaj tradukaĵoj. Gesinjoroj SCHWARZ, ĥore, recitis la "aŭtunan kanton" de VERLAINE: ili samtempe deklamis la poemon, unu esperant-lingve, la alia franc-lingve, Brigitte GIUMMELLY deklamis poemon de Endre Ady kaj Fin° KOPECZ poemon de D-r° ZAMENHOF.
La preleganto ankaŭ klarigis kaj pravigis... 1/ ke esperanto estas vehiklo de la franca kulturo kaj neniel malamiko de la franca lingvo... 2/ ke esperanto ne intencas forigi la aliajn fremdajn lingvojn sed male utilas al ties lernado... 3/ ke esperanto provizas tujajn oportunaĵojn dank' al la deligitaro de UEA kaj la eblecon de internacia korespondado.
La prelego estis sekvita de unu-hora vigla diskuto kaj fine estis decidita la starigo de la esperanto-klubo de METZ, kies kunvenoj okazos en la kultur-domo, ĉiun vendredon inter la 18a horo kaj la 22A kaj duono, kaj kiun aliĝis ĉirkaŭ 15 personoj, ĉefe geinstruistoj kaj gestudentoj.

Brigitte GIUMMELLY

WICKERSHEIM

*La lerneja kurso funkcias bone. La junaj ĉeestantoj jam lernis pli ol duono de la "JUNULKURSO"*

SELESTAT

En la liceaj kursoj restas 67 gelernantoj

MUNSTER

*Dek gelernantoj atingis la 13an lecionon de la Junulkurso. Ĝenerale en ĉiuj liceoj ĉesas nun lerni la gejunuloj de la "finaj klasoj" (terminales), ĉar ili devas prepari siajn ekzamenojn. En ĉiuj liceaj kursoj oni jam preparas la venontan kurs-sezonon per afiŝoj, artikoloj en la licea gazeto, informado al la instruistaro, ktp....*

L A S T - M I N U T E . . . PERKORESPONDA KURSO.... nun aperis 25 artikoletoj (el 46) mi respondis ĉirkaŭ 150 inform-petojn. 50 gelernantoj nun.

BAR-LE-DUC

D-r° GOODHEIR el Glasgow prezentis sian landon antaŭ... 10 ĉeestantoj. Dum la antaŭa tago li "babilis" angla-lingve kun gelernantoj de la "Collège André THEURIET" okaze de normala kurso kaj li klarigis (kaj ankaŭ pravigis!) antaŭ ili la simplecon de la internacia lingvo rilate tiun de la angla.... La profesorino mutis kaj okulumis... jesante la demonstracion! En la jam nomita elementa lernejo la 50 geknaboj diligente daŭre laboras.

FUNEBRO

Ni plej sincere kondolencas al Samideano Yves GUEGUENIAT (Selestat), kiu havis la doloron perdi sian patron en Bretonio, kaj al nia Samideano Pierre FONDRILLON, delegito de UEA en ESSEY-lès-NANCY, kies patrino ĵus forpasis.

# stağo de parolata esperanto (7ª)

## 7 ème STAGE DE L'ESPÉRANTO PARLÉ

### 17AN KAJ 18AN DE JUNIO 1978

en NANCY, Junuldomo PHILIPPE DESFORGES, MJC, 27 rue de la République

Dum niaj staĝoj, jam de nun famekonataj, dank' al rektmetodaj lernolibroj diversgradajj, ĉiuj havas la eblecon paroli en ESPERANTO. Ni invitas samtempe ĉiujn esperantistojn (eĉ komencantojn) en najbaraj regionoj en FRANCIO, GERMANIO, BELGIO kaj LUKSEMBURGIO veni por praktiki kune la vivantan internacian lingvon.

*

ESTOS 4 KURSOJ

- KURSO A-1 → por tuj komencantoj
- KURSO A-2 → por ĵus komencintoj, kiuj atingis la duonon de la 1-a/grada kurso
- KURSO B → por tiuj, kiuj finlernis la 1-a/gradan kurson; ili povos simple babili inter si helpe de la libro "POR LA PRAKTIKANTOJ"
- KURSO C → dank' al la libro "PAŜOJ AL PLENA POSEDO" la lingvoposedantoj fajne konfirmos kaj rigore kontrolos sian lingvoposedon.

*

SABATON, 17an de junio 1978: bonvolu alveni antaŭ la 14a30, por ke la kursoj povu komenciĝi akurate je la 15a. Jen la labor-ritmo:

*kurso (45 minut.), ripozo (15 min.), ĝis la 19a. Tiam funkcios libro-servo Je la 19a30 komuna vespermanĝo, kaj vespere ni trapasos kune tre amikan tago-finon*

DIMANĈON, 18an de junio 1978: atentu! oni povas matenmanĝi nur ĝis la 8a horo!

*Ni parolos de la 9a ĝis la 11a45 (samritme kiel sabate)*
*poste libro-servo kaj tag-manĝo je la 12a30.*

Dimanĉe post-tagmeze okazos (certe!) tiu jam delonge atendita vizito al tropika akvario, planita jam de... monatoj!

Eblas trapasi ekzamenon nome: *atesto pri lernado*
" *pri praktika lernado*
" *pri kapableco*

dimanĉe dum la mateno.

Ankaŭ eblas restadi en NANCIO antaŭ kaj post la staĝo, sed bonvolu precizigi tion!

*La nombro de la litoj estas limigita je 50.*

KOSTOJ: Aliĝ-kotizo → 10F por ĉiu persono. La federaciaj membroj, abonantoj al LA INFORMILO kaj iliaj familianoj, la junuloj sub 18 jaroj pagos nur 5F. Por infanoj ĝis 11 jaroj, senpage.

→ Manĝo (tag-meza aŭ vespera) 12,50F

→ Tra-noktado kaj maten-manĝo (por unu persono)

- *en unu-lita ĉambro* 26F (*rezervitaj por la unuaj aliĝontoj*)
- *en du-lita* " 21F
- *en 3- / 4-lita* 19F

PRIATENTU! Tiuj prezoj validas la 1-an de februaro. Ili poos iom pliaktiĝi)

junia staĝo ——► **aliĝilo** ◄—— junia staĝo

Bonvolu detranĉi aŭ rekopii kaj sendi kun antaŭpago de 20F por ĉiu persono kiel eble plej frue / kaj antaŭ la 3a de junio 1978/ al

| |
|---|
| S-ro J.P. COLNOT |
| 15, rue de Lavaux, 54520 LAXOU |
| PCK 1272-21 L NANCY |

(bonvolu krucumi laŭdezire en la eta kvadrato)

S-ro ☐ S-rino ☐ F-ino ☐ nombro de personoj:

NOMO: Antaŭnomo: Adreso:

Tago kaj horo de alveno: de foriro:

Mi rezervas lito(j)n en ĉambro kun lito(j) sabate vespere.

Suplementaj noktoj (*eventuale*):

Mi rezervas manĝo(j)n sabate vespere por personoj, dimanĉe tagmeze por personoj.

Aliaj manĝoj (*eventuale*):

Mi partoprenos en kurso A1 ☐ A2 ☐ B ☐ C ☐

Mi mendas la jenajn verkojn: Kursoj A1, A2, infanoj: *Junulkurso* 15F ☐

*suplemento* 3F ☐

*kaseto* 30F ☐

*disko-serio* 20F ☐

Kurso B: *Por la Praktikantoj* 18F ☐

Kurso C: *Paŝoj al plena posedo* 20F ☐

Por ĉiuj (*eventuale laŭdezire*) "LEXIQUE FONDAMENTAL" (E° / *Français*) 9F ☐

"*Diction. Pratique*" 28F ☐

"*Diction. Français / E°*" 28F ☐

"GRAND DICTION. ESPERANTO/FRANCAIS" 50F ☐

(*eventuale*): Mi deziras trapasi ekzamenon: *atesto pri lernado* ☐

*atesto pri praktika lernado* ☐

*atesto pri kapableco* ☐

---

# L'ESPERANTO, langue radiophonique par excellence !

**Ĉiutage**

05.00-05.30 Varsovio, 200m (1502 kHz), 75.84m (3955 kHz), 50.04 m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27m (7270 kHz). I.P. Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00950 Warszawa, Pollando.

15.30-16.00 Varsovio, 41.99m (7145 kHz), 31.45m (9540kHz). I.P.

21.30-22.00 Varsovio, 200m (1502 kHz), 75.84m (3955 kHz), 50.04 m (5995 kHz), 41.27m (7270 kHz).

**Dimanĉe**

05.45-05.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), aŭ 16.82m (17840kHz). I.P. ORF Esperanto, Postfach 700, A-1041 Wien, Aŭstrio. Ripeto de la antaŭa sabata programo.

10.30-10.40 Muritiba, 190m (1580 kHz). I. K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.

11.00-11.30 Pekino, 40m, 30m. I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Popola Respubliko Ĉinio.

12.30-13.00 Pekino, 25m, 19m. I.

20.00-20.20 Romo, 41.24m (7275 kHz), 41.15m (7290kHz), 31.33m (9575kHz). P. Radio Roma, Esperanto-Fako, Casella Postale 320, I-00100 Roma, Italio.

20.05-20.15 Vatikano, 196m (1529 kHz), 48.47m (6190 kHz), 41.38 m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 31.10m (9645 kHz), 25.63 m (11705 kHz), 19.84m (15120 kHz). I.P. Radiovaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio.

sekvo dorsflanke ——►

*Etre espérantiste...*
*Ce n'est pas seulement parler avec son coeur,*
*En idéaliste...*

*Ce n'est pas seulement croire en des temps meilleurs*
*Où l'on se comprendra... où l'on n'aura plus peur*
*De la tour de Babel!... Non, être espérantiste,*
*Ce n'est pas seulement brandir le vert fanion,*
*En s'exprimant dans une langue d'union!...*

*Etre espérantiste...*
*Ce n'est pas seulement laisser guider ses pas*
*Par la douce clarté qui se lève là-bas,*
*Jaillissant d'une étoile, en une nuit profonde...*

*Ce n'est pas seulement faire une vaste ronde...*
*En chantant à la Terre un hymne fraternel,*
*Dans un même langage, enfin universel!...*

*Etre espérantiste...*
*C'est d'abord, c'est surtout, en ce monde où nous sommes,*
*C'est unir, c'est servir, c'est aimer TOUS les hommes!...*

Guy AUGUEZ

**Lunde**

00.00-01.00 Sorocaba, 278m (1080 kHz). I.K. Rádio Clube de Sorocaba, rua São Bento 190, BR-18100 Sorocaba, S.P., Brazilo.

18.00-18.15/Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz). P. (d-ro A. Baur). Svisa Kurtonda Radio, Esperanto-Fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.

**Marde**

12.10-12.20 Gdańsk, 66.29 MHz (mod. frekv.). Ripeto, dek tagojn poste, de la sabata programo el Varsovio, unu fojon monate.

20.30-20.45 Ibra Radio, per ondoj de Radio Mediteranea en Malto: 49.34m (6080 kHz).I. Ibra Radio AB, S-105 36 Stockholm, Svedio.

21.35-21.45 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46 m (9535kHz), 30.98m (9685kHz), 25.60m (11720kHz), 25.32m (11850kHz). Ripeto de la lunda programo.

**Merkrede**

18.00-18.15 Berno; ondoj, kiel lunde. P. (s-ro Gacond).

22.00-22.15 Sabadell, 203m (1475 kHz). I.K. Radio EAJ 20, Sabadell, Hispanio.

**Ĵaŭde**

17.50-17.55 Vieno, 203m(1475kHz). I.

21.35-21.45 Berno, ripeto de la lunda programo; ondoj, kiel marde.

**Vendredo**

18.00-18.15 Berno, ripeto de la merkreda programo per samaj ondoj.

20.00-20.30 Pekino, 43m, 33m, 31m. I.

23.05-23.20 Zagrebo, 264m (1163 kHz). P. Radio Zagreb, Esperanto-Fako, Jugoslavio.

**Sabate**

00.10-00.20 Varsovio, 1321m (227 kHz). P. Programo preparita de Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdańsk-Wrzeszcz, Pollando; ĝi okazas unu fojon ĉiumonate dum muzika programo.

11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe.

12.30-13.00 Pekino, kiel dimanĉe.

16.45-16.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 19.86m(15105kHz). I.P.

20.00-20.30 Pekino, kiel vendrede.

21.35-21.45 Berno, ripeto de la merkreda programo; ondoj, kiel marde.

22.00-22.15 Valencio. 358m (836 kHz). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanio.

horsistemo de Greenwich: Francoj, aldonu 1 horon!

## NIAJ DONACINTOJ DUM LA JARO 1977

Donacoj por la aĉeto de flor-krono por S-r° CHAPPELIER

S-r° COLNOT 50F - F-in° MARCHAL 10F - S-r° GODART 10F - S-in° OEHRI 10F - S-in° MULLER M. 30F - S-r° KRAEMER 15F - S-in° NAU 30F - ESPERANTO-GRUPO de STRASBOURG 50F

sume 205F

Donacoj por la Federacia Kongreso en BAR-le-DUC

F-in° JACQUOT 44F - S-r° BERGEROT 94F - F-in° KUBIK 4F - S-r° LONGUE EPEE 38F - S-r° CANUS 4F - S-r° DURAND 14F - S-in° NAU 4F - S-in° ROUILLON 4F - S-r° COLNOT 14F - S-r° DEGRELLE 2F - F-in° TRIOLLE 4F -

sume 226F

Donacoj por la Federacio

S-r° BERGEROT 328F - S-r° ALIZON 20F - S-r° WERMELINGER 10F - S-r° FRANCOIS 13,50F S-in° NAU 10F - S-in° OEHRI 20F - S-r° SELLE 10F - F-in° STUTZMANN 12F - S-r° DURAND 8F - S-in° RUFF 1F - S-in° MULLER 3,50F - S-in° ORY 20F - S-r° KISSENBERGER 7,50F - S-in° OEHRI 3,80F - Vendo de donacitaj vortaretoj fare de S-r° LIENHARDT 176F - S-r° DEGRELLE 15F

sume 658,30F

Ni sincere dankas al niaj malavaraj donacintoj, dank'al kiuj ni sukcesis aĉeti flor-kronon por S-r° CHAPPELIER, kompensi la deficiton de nia federacia kongreso kaj konservi sanan financan situacion.

## FINANCA RAPORTO PRI LA JARO 1977

ENSPEZOJ*

| | |
|---|---|
| *85 kotizoj* | 6335 |
| *1 kotizo al GEE* | 7 |
| *3 federaciaj kotizoj* | 21 |
| *donacoj (tut-sume)* | 1089,30 |
| *abonoj al esperanto-revuoj* | 759 |
| *vendo de libroj* | 95 |
| *vendo de markoj, propagandiloj* | 61,20 |
| *rentumo de nia ŝpar-kaso* | 101,75 |
| *sume* → | 8469,25 |

ELSPEZOJ*

| | |
|---|---|
| *kotizoj al UFE* | 5733 |
| *kotizoj al GEE* | 136 |
| *kotizoj al JFEO* | 51 |
| *afrankoj, sekretariaĵoj* | 438,26 |
| *propagando* | 200 |
| *perado de abonoj* | 759 |
| *aĉeto de libroj, propag.* | 110,60 |
| *flor-krono + funebra anonco por S-r° CHAP.* | 247 |
| *kongres-deficito BAR-le-D.* | 473,60 |
| *sume* → | 8148,46 |

ABONADO DE "*La INFORMILO*" 1977:

| | |
|---|---|
| *146 abonantoj* | 1447 |
| *57 lernanto-abonantoj* | 255 |
| *sume* → | 1702 |

| | | | |
|---|---|---|---|
| *multobligado* | (Inf. 17) | 350 ekz | 278,50 |
| | ( 18) | 300 | 136 |
| | ( 19) | 380 | 318,20 |
| | ( 20) | 380 | 316,20 |
| *send-kostoj por Inf.* | 16 (1976) | | 11,40 |
| | 17 (1977) | | 143,43 |
| | 18 | | 117,05 |
| | 19 | | 120,49 |
| | 20 | | 144,02 |
| | *sume* → | | 1585,29 |

BILANCOJ


| | | |
|---|---|---|
| enspezoj | Federacio | 8469,25 |
| elspezoj | Federacio | 8148,46 |
| → profito | Federacio | 320,79 |
| enspezoj | INFORMILO | 1702 |
| elspezoj | INFORMILO | 1585,29 |
| → profito | INFORMILO | 116,71 |

REZULTO

| | |
|---|---|
| en la kaso (31/12/76) | 1265,67 |
| profito Federacio | 320,79 |
| profito INFORMILO | 116,71 |
| → en la kaso (31/12/77) | 1703,17 |


la kasisto: A. GROSSMANN








## KRUC-VORT-ENIGMO*



HORIZONTALE

1- marnutraĵo. 2- necerta momento- malĝuste- ĝuste- greka litero. 3- ŝanĝas la direkton de lumradio- 4- matena horizonto- Siberia riverego (sen finaĵo). 5- emblemo- prepozicio. 6- pensiite- scienca finaĵo. 7- subjunkcio- pliboniga modifo en leĝpropono. muzikpeco (fonet.)- agrable sonori- pronomo. 9- moviĝi (sen fin.)- taĉmento (fon.) - metalo- unuo de energio (sen fin.) 10- ĝi ofte entombigas projekton!

VERTIKALE 1- scienco pri eksplodaĵoj. 2- mezuras la densecon de gasoj. 3- plenaera spektaklejo (sen fin.). 4- Helena mar-dio (sen fin.) solulo. 5- elfluadigilo (radik.) aspekto de l'vizaĝo. 6- ritmo de la mezuro- pura sono (fonet.)- nombro. 7- kuraca arto por membroj. 8- lingvisto - havi en la manoj (radik.). 9- tirane premegi- reĝa moŝto. 10- scienco pri la vivantaj estaĵoj (radik.)

## "SILAB"-ENIGMO*

*Pere de la ĉi-subaj alfabete ordigitaj "silaboj", vi plenigu la kolonojn laŭ la difinoj dekstre. La 1a kaj 3a kolonoj eldonas proverbon, se vi legos ilin vertikale.*

ago ale ank ap ĉa dio do eg er er fa ĝe i ino ka ko liu lo mu nes o ol orp os ov pr p a ro ro ro si so te to ur vi vo

| | |
|---|---|
| + . + | antaŭ la koko |
| + . + . . . | prefero al iu |
| + . + . | globo |
| + . + . . | tute simile |
| + . + . | pafi bestojn |
| + . + . . | ŝip-tenilo |
| + . + . . | ne erari |
| + . + | prepozicio (miksita) |
| + . + | granda estaĵo |
| + . + . . . . | vir-antaŭnomo |
| + . + . | konciza lingvo |
| + . + . . | naskiĝi |
| + . + . | besteto |
| + . + . . | ĉef-urbo |
| + . + . | kiu necesas rapidecon |
| + . + | lui senorde |
| + . + . | ĉef-urbo |
| + . + . . . | mineralo |

*imprimé par les soins du Secrétariat des Associations, 12 rue Voltaire, 55000 BAR-le-DUC. Le rédacteur: Pol DENIS. Le directeur de la publication: JP COLNOT.*
*Dépôt légal n° 245*

# LIBROSERSO

Mendoj sendotaj al Roger DEGRELLE - 11, Cours Léopold - 54042 NANCY CEDEX
CCP 2555 38 L NANCY

Aldonu 15% por ĉiu mendo suba je 50,00 F
10% supra 50,00 F
Tamen minimume : 2,00 F

**NUN TUJ HAVEBLAJ :**

| | |
|---|---|
| Al Torento | 10,50 |
| Anni kaj Montmartre | 17,50 |
| Bodil kaj la bando | 17,50 |
| Brilo de Fantomo | 9,00 |
| Ĉu vi deziras korespondi | 4,00 |
| Ĉu vi kuiras ĉine | 27,00 |
| Dekkinga flugas | 13,50 |
| Disko | 13,50 |
| Doktoro Dorner | 30,00 |
| Else kaj Bo (por knaboj) | 5,50 |
| Ferio kun la morto | 8,00 |
| Fianĉo de l'sorto | 40,00 |
| Gajaj klubversperoj | 4,50 |
| Gizela kaj Roberto (skeĉoj) | 4,50 |
| Grete kaj Jep (por geknaboj) | 5,50 |
| Gudrun | 22,50 |
| Infanoj en Torento | 13,50 |
| Jen la kanto de l'vojaĝ' | 4,50 |
| Jen la kanto : melodiaro | 4,50 |
| Judoj sen mono | 22,50 |
| Junuloj en Torento | 17,50 |
| Kantu kun Ramona | 3,50 |
| Kie boacoj vagadas (novelaro) | 9,00 |
| Kiel akvo de l'rivero (Schwartz) | 44,50 |
| Kit vivas | 24,00 |
| La forto de l'vero (por komencant.) | 8,00 |
| La ĝoja podio (Schwartz) | 27,00 |
| La lanternisto (rakontoj) | 22,50 |
| La mirinda eliksiro (noveloj) | 10,50 |
| La reto (teatraĵo) | 4,50 |
| La stranga butiko (Schwartz) | 17,50 |
| La Senlingvulo (Korolenko) | 22,50 |
| Misteroj de l'vivo (por geknaboj) | 9,00 |
| Morsoklubo (por geknaboj) | 4,50 |
| Ne tiel sed tiel ĉi (por bona stilo) | 8,00 |
| Ni aktoras (Boulton) | 4,50 |
| Ni, Homoj (rakontoj) | 10,50 |
| Ni komedietas | 4,50 |
| Ni ludas (47 ludoj) | 4,50 |
| Ni ludas teatraĵojn | 4,50 |
| Nia originala prozo | 9,00 |
| Nokto da timo (noveloj) | 10,50 |
| Novaj esp. historietoj (3a eldo.) | 8,00 |
| Patroj kaj Filoj | 22,50 |
| Pli ol fantazio (noveloj) | 7,00 |
| Printempo en aŭtuno (Baĝy) | 13,50 |
| Rakontu, samideano (rakontoj) | 9,00 |
| Roseroj (melodiaro) | 10,50 |
| Savo el la neĝo (por geknaboj) | 8,00 |
| Simplaj floroj (melodiaro) | 9,00 |
| Skizoj pri teorio de Esperanto | 9,00 |
| Somera simfonio (sonetaro) | 9,00 |
| Sub la signo de la verda stelo | 9,00 |
| Suno kaj pluvo (novelaro) | 12,00 |
| Sur insulo malproksima | 7,00 |
| Taglaboristoj | 25,00 |
| Trans la fabeloceano (fabeloj) | 20,00 |
| Urbo de terura nokto (eposo) | 9,00 |
| Venis viro (rakonto) | 13,50 |
| Verda robo (romano) | 26,00 |
| Verdkata testamento (Schwartz) | 17,50 |

(ĉiuj libroj el dana Esperanto-eldonejo)

**El aliaj eldonejoj :**

| | |
|---|---|
| Junulkurso | 15,00 |
| Suplemento al la junulkurso | 3,00 |
| Diskoserio de la junulkurso | 20,00 |
| Minikasedo de la junulkurso | 30,00 |
| Nouveau cours rationnel | 20,00 |
| Dictionnaire pratique (Fr-Esp/Esp- | 28,00 |
| Dictionnaire de poche /Fr | 5,00 |
| Plena vortaro | 30,00 |
| Grand Dictionnaire Esp-Fra. | 49,00 |
| Plena ilustrtita vortaro de Espe. | 160,00 |
| (kun sendkosto registrite | 171,20) |
| Vivo de Zamenhof (Privat) | 38,00 |
| Olivier Tzaut k kantas (disko aŭ kasedo) | 50,00 |
| Legu kaj ridu | 7,00 |
| Esperanto por infanoj | 7,00 |
| Por la Praktikantoj | 18,00 |
| Paŝoj al plena posedo | 18,00 |
| Preparo al kapableco | 12,50 |
| Gvidlibro por ekzamenoj | 4,00 |
| Lingvaj respondoj | 14,00 |
| Fundamento de Esperanto | 21,00 |
| Esperanta legolibro | 7,00 |
| Vagado sub palmoj | 11,00 |
| Rozinjo (tr. de Kalocsay) | 13,00 |
| Cent ĝojkantoj | 13,50 |
| Marta (Zamenhof tradukis) | 18,00 |
| Sankta Biblio | 45,00 |
| Internacia Lingvo en Eklezio kaj Mondo | 39,00 |

Antaŭ ol pagi, bonvolu atendi la fakturon ĉiufoje kunmetitan en la pakaĵo.
Mi atendas viajn mendojn eĉ pri libroj ne enteniitaj sur ĉi listo.
Baldaŭ tuj haveblaj : La Granda kaldrono kaj Izolo (Kalocsay)

Gis